Fritz Gurgel,

# Mia Stetino

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kiam en trankvila horo
pensoj tiras hejmen min,
venas ree la memoro
pri la bela urb' Stetin'!

Stratoj, placoj reestiĝas
jen ne mia fantazi',
bildoj, kiuj ne paliĝas,
ree ilin vidas mi.

Vidas pontojn svingiĝantajn
mi trans Odro, la river',
sonorilojn sonorantajn
aŭdas mi dum la vesper'.

Reve mi rigardas arkon
de l' iama urb-rempar',
kaj tramigras mi la parkon,
ĝis mi venas al arbar'.[2]

Vidas mi la domon tiam,
kie iam loĝis mi,
aŭdas gajajn kantojn, kiam
rememoras mi pri ĝi.

. . .

[2] aŭ:
ĝis la Ekerberg-arbar'.

Fritz Gurgel,

# Mein Stettin

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

. . .

Kara urbo, cin neniam
Povas ja forgesi mi!
Mi sopiros cin por ĉiam,
ĉar naskiĝis mi en ci!

*Traduko de la Germana poemo "Mein Stettin" de* FRITZ GURGEL *(∗1899-03-04 – †1977-06-04) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 2007-1.*

*MR-464-1a / Arg-810-1625 (2013-02-02 15:03:35)*

*La filo de la verkinto, s-ro Joachim Gurgel, loĝanta en D-38518 Gifhorn, Moltkestr. 10, Germanio, (retadreso: jochengurgel@aolcom), konfirmis al mi, Manfred Retzlaff, en 2007-11-18, ke lia patro Fritz Gurgel publikigis la poemon en la jaro 1967 en la gazeto „Pommersche Zeitung" (Pomera gazeto).*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* FRITZ GURGEL *(∗1899-03-04 – †1977-06-04).*

*Arg-810-1624 (2013-02-02 15:06:46)*

*Der Sohn des Verfassers, Herr Jochen Gurgel (Moltkestr. 10, D-38518 Gifhorn), hat mir mit Netznachricht vom 28.11.2007 die Erlaubnis erteilt, das Gedicht mit meiner Esperanto-Übertragung zu veröffentlichen. Das Gedicht ist im Jahre 1967 in der Zeitschrift "Pommersche Zeitung" erschienen.*